October 1926 No. 6 12e Jaargang

# NEDERLANDA KATOLIKO

Maandelijksch officieel orgaan van den Nederl. R. K. Esperantistenbond „Nederlanda Katoliko", gevestigd te 's Hertogenbosch. Opgericht 29 Aug. 1909

Bisschoppelijk en Koninklijk goedgekeurd — „Ĉion per amo, nenion per forto." (S. Fr. de Sales).

VASTE MEDEWERKERS: Br. AUGUSTINUS, H. DAMEN, Br. EULOGIUS, PATER CALL. PRELLER O.P., H. A. ROELOFS, P. A. SCHENDELER en H. B. van ZWET

Abonnementsprijs f 1.50 per jaar
Eksterlanda Jarabono . . f 2.—

Hoofdredactie:
P. HEILKER TE HOOFDDORP.
Adres van Administratie:
THEO BODDEKE TE BUSSUM.

Afzonderlijke nummers 15 Cts.
Advertentiën per vakje 75 Cts.

## Esperanto als leervak op de Lagere School?

Met de belangstelling voor en de verbreiding van de internationale hulptaal Esperanto gaat 't steeds **crescendo.** Het E. is nu reeds in 100 landen verspreid en de U.E.A. = **Universala Esperanta Asocio** telt leden in 82 landen.

Niet alleen door scheepvaart- en spoorwegdirecties, Kamers van Koophandel en Jaarbeurzen, maar ook door Posterijen, Telegrafie, Radio enz. wordt het Esp. steeds meer en meer benut. Het aantal boeken, zoowel vertalingen als origineele, stijgt als 't ware met den dag. Zoo pas nog verscheen bij de wereldbekende uitgevers firma **Rudolf Mosse** te Berlijn o.a. de vertaling van De Kleine Johannes, van Fred. v. Eeden. Op 't laatst gehouden Vredescongres — 28 Aug.-5 Sept. — te Genève, waaraan 200 gedelegeerden uit alle landen van Europa deelnamen, werd onder meer het voorstel besproken om van af 1931 alle redevoeringen voortaan **slechts** te laten overzetten in Esperanto. Na eene interessante discussie tusschen **Von Gerlach, Forster** en **Dr. Privat** werd het woordje **slechts** teruggenomen, om de al te bejaarde heeren „op hun ouden dag" niet te noodzaken nog Esp. te gaan leeren.

Geen wonder dan ook dat bij een dergelijken stand van zaken het aantal deelnemers aan Esperanto-cursussen steeds toeneemt. Ook ons land blijft in dezen niet achter. Te Nijmegen alleen bedroeg het aantal ingeschrevenen de vorige maand reeds 760. Het zal dan ook wel geen verwondering baren, dat er steeds meer en meer stemmen beginnen op te gaan — vooral in de onderwijsbladen — om Esperanto als verplicht of facultatief leervak op de lagere school ingevoerd te krijgen. Met dit doel heeft de Nederl. Esperantisten Vereeniging ook reeds een request gericht tot den Minister van Onderwijs, terwijl met het oog op de aanstaande voorstellen tot wijziging van de Onderwijswet aan alle Kamerleden de brochure is toegezonden: „Waarom Esperanto-onderwijs op de L. S?" Dit keurig gedrukt en goed gedocumenteerde werkje is dezer dagen bij Malmberg-Teulings verschenen.

Zoo juist vernemen wij nog uit „de Rotterdammer", dat door eenige Kamerleden een voorstel zal gedaan worden om Esperanto als facultatief leervak in te voeren. Het ontwerp zal waarschijnlijk worden ingediend door mej. Westerman en een viertal leden der Kamer hebben zich bereid verklaard het voorstel te verdedigen.

Br. A.

## MEZEPOKAJ EKZEMPLOJ

### EKZEMPLO DE DU ALTAJ PATROJ

Du altaj patroj vivis kune multe da jaroj kaj neniam havis disputon. Diris unu al alia: Disputu ni tiel, kiel homoj faras. Li respondis al frato kaj diris: Mi ne scias kiel oni devas disputi. Tiam li diris: Vidu, mi metos malgrandan ŝtonon meze de ni kaj mi diros: Tio estas al mi; sed vi diros: Ne, estas al mi, kaj tio estos la komenco de l'disputo. — Ili faris tiel kaj unu el la du diris: Estas al mi! La alia respondis: Ne, estas al mi! Tiam la unua denove diris: Estas vere, estas al vi, prenu kaj iru, kaj ili foriris tielmaniere unu for de alia kaj ili ne povis disputi.

### EKZEMPLO DE PIA FRATO

Estas skribita en „la Ŝtuparo de l'Ĉielo" de pia frato kiu deziris de l'bona Dio scii la diferencon inter la nuntempa vivo kaj de la altega gloro. Kaj li preĝis fervore, ke Dio volu elmontri al li la plej malgrandan karbon de la senfinaj ĝojoj. Tial unutage li iris promeni en arbaron, kien la anĝelo de Dio estis sendinta lin. Subite aŭdis li voĉon de najtingalo, kiu lin plenigis de ĝojo tielmaniere, ke li restadis ekstazite aŭskultanta la dolĉan kantadon — Sed kiam li denove eniris en la monaĥejon, li ne rekonis eĉ unu personon. Multe li surpriziĝis kaj kiam li diris, kiu estis lia tiama abato, ili legis en la malnovaj libroj, ke tempe de la abato, kiun li nomis, monaĥo foriris, pri kiu ne homo ekaŭdis plu, nek iu sciis, kien li estas foririnta. Estis tiu homo, kiu staris kvincent jarojn. Kaj li kredis mem, ke li staris nur unu horon. Oni povas supozi, ke ne estis najtingalo, kiu kantadis, sed ke estas anĝelo de Dio.

Se la sono kaj kanto anĝela kaŭzis jam tiom da ĝojo, konsolo, kaj kontenteco, kiom da feliĉo estos en la reĝo de l' ĉielo, kie troviĝas ĉiam Dio mem, kaj Mario, la benita Patrino de Kristo, kun ĉiuj anĝeloj kaj sanktuloj kaj tute la ĉiela militistaro kaj tiujn oni neniam povas perdi.

Schiedam. HENRIKO SINGELANO.

## Krachtige Hulp

We hebben krachtige hulp gekregen in een der redacteuren van „Het Katholiek Schoolblad". Van zijn hand verscheen reeds tweemaal een kort artikel ten gunste van Esperanto, terwijl de indiening van het voorstel om E. als facultatief vak in de wet op te nemen, zijn volle sympathie heeft. Als we de onderwijzers hebben, komt de zaak spoedig voor mekaar.

En als de minister nu eens honderd pop per jaar geeft voor diploma B., zullen de liefhebbers bij de vleet opdagen.

## Finaal omgeslagen

In Hoorn was een vergadering van R.K. onderwijzers en onderwijzeressen. Daar heeft een der onzen over Esperanto gesproken. Vóór de vergadering was er algemeen antipathie en septicisme. Na de vergadering . . . luister, wat de secretaris in 't Kath. Schoolblad schrijft:

„Vele onzer leden zal het gegaan zijn als mij. We zijn ter vergadering gegaan hoogstens met een gevoel van koele onthouding, misschien zelfs met vooroordeelen behept en grif bereid het Esperanto af te wijzen. Het mag den spreker dus een groote voldoening zijn, dat duidelijk uit de gesprekken, gehouden toen de lezing geëindigd was, bleek, dat we allen **bewonderaars** van het Esperanto geworden zijn, ja zelfs, dat naar alle waarschijnlijkheid meerderen onder ons tot de daadwerkelijke Esperantisten zullen gaan behooren."

O, zoo! Finaal omgeslagen in twee uur en 10 minuten.

## Geen nieuws onder de zon

Het „Algemeen Handelsblad" bevatte een verhaal, schokkend en boeiend. Een meisje uit Holland had gecorrespondeerd met een Amerikaansche dito, en wel in 't Engelsch. Men is er enthousiast over. Welk een perspectief. . . .

Men weet niet, dat zoo iets bij ons al lang bestaat en dat niet enkel met Amerika in 't Engelsch, doch met welk land ge wilt, in 't Esperanto gecorrespondeerd wordt.

Zeventien Hoofddorpsche schooljongens staan b.v. in geregelde correspondentie met zeventien Duitsche collega's en ieder heeft zijn eigen correspondent. Straks krijgen ze er een Spaanschen of Franschen, of Italiaanschen correspondent bij. En dat met niet meer dan één taal: het Esperanto.

## OFICIALA PARTO

FAVORANTOJ:

Novaj: Sro A. Winters, Hoogstraat B 28, Veghel.
Fino C. Trompetter, Noord-Scharwoude (N.-H.)
Adresŝanĝo: K. Haffmans, „Stella Maris", Schaeck Matonsingel, Nijmegen.

PETO: Ni petas insiste al la sekretarioj(inoj de la Unuiĝoj ĉiam sendi la ŝanĝojn en la anara listo ĉiumonate antaŭ la 20a al la sekretariejo: Schoolpad 21, Laren N.H.

## BINNENLAND

De firma Philipsen en Van Hussen te Cuyk heeft een nieuw merk sigaren in den handel gebracht, n.l. „Kansas", met de seriemerken **in Esperanto** als volgt: Eta, Miskolora, Fuminda, Bonodora, Flora, Bonega, Agrabla, Dezirinda, Longforma, Eleganta, Granda, Preferinda, Perfekta, Afabla, Glora, Brilega, Rava, Plej Delikata.

Misschien wil de ondernemende firma wel per advertentie de prijzen van al die kwaliteiten bekend maken.

Door bemiddeling van onze redactie is voor een bona-fide sigarenfabrikant het **gedeponeerde** merk „Dr. Zamenhof" te verkrijgen.

Het bestuurslid van N. K., de weleerwaarde pater Call Preller O.P., is verhuisd van Alkmaar naar Amsterdam, en wel pastorie Spuistraat 12, waar de bekende leider van den K.R.O., de zeereerwaarde pater L. Perquin, pastoor is. Nu krijgen we zeker spoedig Esperanto-lezingen voor den microfoon.

Door den Hilversumschen Draadloozen Omroep worden dezen winter wederom taalcursussen gegeven onder leiding van den sympathieken Engelschman Fry. Fransch, Engelsch en Duitsch staan op de lijst, van Esperanto wordt niet gekikt. Onbekend.

---

## Mirakloj

Multaj homoj ne kredas, ke okazas mirakloj, t.e. faktoj neklarigeblaj per naturaj fortoj. Ekzemple la multaj okazintaĵoj en Lourdes, kie jam centoj da malsanuloj, mortantuloj subite en parto de unu sekundo saniĝis, estis videblaj por ĉiu neblindulo; tamen multaj homoj ne akceptas tiujn faktojn kiel miraklojn. Oni eĉ kuraĝas nei ilin.

Oni ne forgesu, ke la Sankta Virgulino antaŭdiris, ke okazos per Sia helpo mirakloj. Ankaŭ per helpo de aliaj sanktuloj ofte okazis mirakloj. Ĵus ni legis, ke pere de Sankta Tereso de l'Infaneto Jesuo, monaĥino subite saniĝis. Jen la raporto de la „Belgische Standaard": En la monaĥinejo en Luigne (Belgujo), kie la Franciskaninoj, antaŭe forpelitaj de la franca registaro, ankaŭ loĝas fratulino nomata Mario Miĥaelo, kiu depost kelka tempo estis grave malsana, tiel ke la kuracisto juĝis ŝin nekuracigebla. En la nokto, kiu estus laŭ la juĝo de tiu kuracisto, la lasta, la aliaj fratulinoj subite aŭdis laŭtan kriadon de la malsanegulino: „Mi estas saniĝinta. Jen en tiu angulo la Sankta Tereso mirakle aperis. . . ."

La sekvintan tagon la kuracisto konstatis tion. Ŝi vestis sin kaj matenmanĝis kun apetito, rekomencis la ordinaran laboron kaj faris poste pro danko pilgrimadon al Lisieux, kie estas la tombo de l'Sankta Tereso. Ŝi kunprenis bildon skulptitan de S. T. kaj ĝin lokis en sia ĉelo, metante antaŭ ĝi ĉiun tagon kelkajn rozojn.

La estrina de l'monaĥinejo, ekrimarkinte tion, ĝin malpermesis, opiniante, ke rozodoro en dorma ĉambro estas nesaniga. Kompreneble la fratulino obeis. Tamen la estro, enirante la ĉambron en la sekvinta tago, ekflaris la saman odoron, pro kio ŝi riproĉis la monaĥinon. Tiu ĉi tamen konfesis, ke ŝi ne estis malobea kaj ke ŝi ne almetis rozojn.

Plue esplorante, la monaĥinestro kun mirego konstatis, ke la ĉiela odoro eliĝis el la ŝtonaj rozoj troviĝantaj en la skulptita bildo. Tio jam daŭras nun pli ol tri monatojn, dum kiuj oni kiel eble plej prudente konservis la sekreton.

Rimarkinde estas, ke la odoro tuj malaperis, kiam oni alilokis la bildojn kaj tuj denove eligis, kiam ĝi estis samlokigita.

La leĝoj de nia Eklezio ne tuj rekonas miraklon, sed nur volas konstati tion, post kiam rajtigitaj sacerdotoj estas sufiĉe esplorintaj kaj oficiale konstatintaj ĝin kiel supernaturan fakton.

* * *

Alian gravan fakton mi mem spertis. Ĝi rilatas mian bonan patrinon, kiu en la jaroj 1922a kaj 1923, grave suferis pro kormalsano. En Majo de tiu lastnomita jaro ŝi sentis emon pilgrimi al

**KATHOLIEKEN! Wordt lid van een der aangesloten Katholieke Esperantisten-Vereenigingen of begunstiger voor minimum f 1.— per jaar, met orgaan minimum f 2.— per jaar.**

Lourdes. Ĉiam ŝi havis infanecan konfidon je Sankta Mario, la Dia patrino.

La kuracisto malpermesis la pilgrimadon, ĉar tia laciga vojaĝo certe kaŭzus la morton. La 7an de Junio 1923a tamen mia patrino kun mia patro kaj fratino forvojaĝis, post ke ni kortuŝe adiaŭis patrinon karan ĝis en la ĉielo. Ŝi tamen, ridetante, promesis reveni en Schiedam, kie miaj gepatroj loĝas.

La triopo dumnoktiĝis en Roosendaal, kaj la sekvintan matenon ili forveturis de tie al Parizo. Dumvoje la malsano ĝuste laŭ aserto de l'kuracisto pligraviĝis. En Parizo oni estis devigata peti kuracistan helpon. Tamen la vojaĝo malgraŭ ĉio estis daŭrigata ĝis Lourdes. Pli morta ol viva mia patrino tie alvenis.

Ĉe la groto dum tri tagoj ŝi preĝis, preĝegis, petegante la Dian helpon pere de Lia Sankta Patrino.

Post kvartaga restado ŝi faris seninterrompe la hejmenvojaĝon; ŝi dumvoje ne dormis, ne plendis pri la koro sed kontraŭe sentis sin pli viva, pli gaja ol iam antaŭe.

Mi en Hoofddorp dum la pilgrimaj tagoj ĉiu hore atendis telegramon anoncantan la patrinan morton. Ne alvenis telegramo, sed post kelkaj tagoj alvenis en Hoofddorp... mia patrino mem, ridetante kaj dirante: „jes, filo mia, la Dia patrino pli bona kuracistino estas ol la plej fama tera kuracisto".

Nun, la 27an de Aŭgusto 1926a mi sidas en unu el la ĉambroj de la gepatra hejmo en Schiedam kaj verkas tiun-ĉi rakonton, dum mia patrino en apuda ĉambro faras sian mastrumadan laboron.

De tempo al tempo ŝi envenas mian ĉambron kaj vidante mian ĉiam moviĝantan plumon; ĵus diras: ĉu vi neniam ripozos dum via libertempo?

Kaj mi respondas: jes, mia patrino kara, mi tiamaniere libertempas plej dolĉe, skribante por la legantoj de nia kara monata revueto.

Sed ŝi ne komprenas, ke la temo de mia skribaĵo rilatas ŝin mem.

## HUMORAĴOJ

### SENKULPIGO.

Patrino: — Mi opinias, Joĉjo, ke vi diris, ke la knabeto de nia najbaro tiel breuegis. —

Joĉjo: — Tio estas vera, patrinjo, sed mi batis lin per bastono. —

### FLATULO.

Senharulo: — Kelnero, jen kuŝas haro en la supo! —

Kelnero: — Ĉu ĝi ne apartenas al vi eble? —

Gasto: — Vi estas flatulo kaj certe aludas bonan trinkmonon. —

### REKLAMO.

Antaŭ nelonge en Boston loĝis tri tajloroj en la sama strato. Kiam unu el ili havigis al si reklamtabulon, anoncantan — La plej bona tajloro de Boston, — la dua sentis la bezonon ankaŭ fari ion. Li pentrigis elpendaĵon kun la vortoj: — La plej bona tajloro de la Unuigitaj Statoj de la Norda Ameriko. —

Poste la tria koncize publikigis: — La plej bona tajloro de tiu ĉi strato. —


## ADVERTENTIËN

A. E. VAN BUSSUM:
ESPERANTO-LEERBOEK
Voor Cursus, School en Zelfstudie . . . . . . f 1.25

J. B. EISELIN:
HANDELSTERMEN NEDERL.-ESPERANTO
benevens pl.m. 1500 spreekwoorden en uitdrukkingen f 1.20

L. C. G. MALMBERG, UITGEVER
's-HERTOGENBOSCH — — — ANTWERPEN